

ranto, krom la « Fundamento ». La Lingva Komitato certe rajtas verki ian « Gramatikon de la Lingva Komitato », sed. — same kiel ni diris pri la vortaro, — ĉio en ĝi, ne troviĝanta en la « Fundamento », neniel povus havi ian karakteron de *devigeco* aŭ de *oficialeco*, sed nur esti *private rekomendita* de la Komitato.

Por Esperanto ekzistas *nur unu* oficiala gramatiko : la « Plena gramatiko de Esperanto » verkita de D-ro Zamenhof mem kaj en kvin lingvojn tradukita en la « Fundamento » :

Por ĝi ekzistas *nur unu* oficiala vortaro : la « Universala Vortaro » de D-ro Zamenhof ;

Nenio alia povas esti *oficiala* kaj *deviga*, sed nur *private rekomendita* kaj lasata al la libera akcepto aŭ neakcepto de la Esperantistoj.

« Mi amantas ».

Kelkaj Esperantistoj opinias, ke estus pli bone diri : « mi amantas, mi amontis, mi amitus » k. t. p., ol « mi estas amanta, mi estis amonta, mi estus amita », k. t. p., formoj al ni donitaj *en la Fundamento*, kaj sekve *devigaj* por ĉiuj. Ili vere ne pretendas, ke la proponata sinteza formo estus pli klara, ol la nuna ; ili nur trovas, ke frazo, enhavanta tiajn formojn de konjugacio, estus pli agrabla kaj malpeza, ol la sama frazo kun la formoj de l' Fundamento.

Pri tiuj sintezaj formoj unu el iliaj partianoj antaŭ ne longe demandis D-ron Zamenhof kaj ricevis la jenan respondon :

« La formoj « amatas », « amitas », k. t. p., anstataŭ « estas amata », « estas amita », per si mem ne prezentus ian rompon en nia lingvo, kaj, se la Lingva Komitato volus ilin aprobi, oni povus tre bone ilin uzi. Tamen, se la privataj aŭtoroj per sia *propra* iniciativo volus uzi tiujn formojn, mi tion ĉi ne konsilus. Privataj aŭtoroj povus enkonduki tiun ĉi novan formon nur en tia okazo, se « as », « is », k. t. p. signifus « estas », « estis » ; sed, kvankam pli aŭ malpli frue la verbaj finiĝoj eble ricevos la signifon de la verbo « esti », tamen ĝis nun ili tiun ĉi signifon *ne* havas. » (1)

Ke la *formoj* « amatas », « amitas », *per si mem* ne pre-

(1) *La Revuo*, Aprilo 1907, p. 377.

zentas ian rompon en nia lingvo, pri tio ne povas ekzisti eĉ la plej malgranda dubo, kaj facile estis antaŭdirebla la respondo de D-ro Zamenhof pri tiu ĉi punkto. Ni ja rajtas — almenaŭ teorie — per simpla kunmetado de la diversaj elementoj de la lingvo formi *tute regule* senfinan nombron da vortoj ; kaj kiom ajn stranga kaj senseca povas esti vorto tiel formita, ĝia *formo* tamen ne prezentas *per si mem* ian rompon en nia lingvo, eĉ se la vorto havas nenian sencon, kiel, ekzemple, « malbotelo » aŭ « iĝidestremulo ».

Pri la formoj mem « am-at-as », « am-it-as », ni do ne bezonas ies ajn aprobon ; ni ja tuj vidas mem, ke ili nur konsistas el tri esperantaj elementoj iamaniere kunmetitaj, kaj se la Lingva Komitato volus nur konstati, ke ili prezentas *per si mem* nenian rompon en nia lingvo kaj estas regule formitaj, ĝi simple perdus sian tempon, ĉar ĉiu Esperantisto povas mem fari tiun evidentan konstaton kaj ne bezonas por tio helpon de la Lingva Komitato.

La demando ne estas do : Ĉu tiaj *formoj* estas regulaj ? — ili ja estas tiel same regulaj, kiel « malbotelo » aŭ « iĝidestremulo », — sed : ĉu la Fundamento permesas ilin uzi *anstataŭ* « estas amata » kaj « estas amita » ?

D-ro Zamenhof pri tio respondas mem, ke la nova *formo* estus enkondukebla « nur en tia okazo, se « as », « is », k. t. p. signifus « estas », « estis » ; sed kvankam pli aŭ malpli frue la verbaj finiĝoj eble ricevos la signifon de la verbo « esti », tamen ĝis nun ili tiun ĉi signifon *ne* havas ».

Kiu do povus pli aŭ malpli frue *doni* al la verbaj finiĝoj la signifon de la verbo « esti », kiun ili *ne* havas en la Fundamento ?

Ĉu la Lingva Komitato ?

Absolute ne ! Neniu havas nek povas havi la rajton ion ajn aldoni al nia Fundamento.

Ne Akademioj aŭ Komitatoj povas enkonduki en ian lingvon novajn esprimojn, novajn formojn aŭ neologismojn. Privataj aŭtoroj povas ilin ekuzi sub sia persona respondeco, kaj, se la de ili ekuzita esprimo montriĝas bona, konforma je la spirito de la lingvo kaj al ĝia natura evolucio, en tia okazo troviĝas baldaŭ imitantoj kaj iom post iom la nova esprimo eniras en la ĝeneralan uzadon, kion poste povas nur konstati la Akademioj aŭ Komitatoj.

Tia estis, ekzemple, la sorto de l' sufikso « aĉ » private proponita de Sinjoro Boirac. Nenia komitato ĝin aprobis aŭ rekomendis, tamen ĝi sen ia aprobo pli kaj pli uziĝas, verŝajne ĉar ĝi respondas veran bezonon kaj estas konforma je la spirito de Esperanto. Same okazis por la vorto « bildo » private proponita de S-ro Th. Cart ; same okazos eble por la prepozicio « de-post » proponita kaj ofte uzata de S-ro G. Moch, sen ia bezono de aprobo.

Ankaŭ pri la sintezaj formoj « amatas », « amitas » k. t. p. eble okazos, ke iu aŭtoro ilin ekuzos, kvankam ili ne estas al li konsilindaj, konvinkite, ke ne estas por tio necese, ke la verbaj finiĝoj havu per si mem la sencon de la verbo « esti ».

Cu tiam la diritaj formoj « sukcesos », kaj ĉu la iniciatinto trovos multajn imitantojn ?

Mi ne kredas.

La sinteza formo estas ja nedubeble malpli klara, ol la analiza.

Sen ia dubo, kiam oni diros al iu Esperantisto : « Se mi mortigĉtus, vi eble kredintus, kion mi dirintis », li devos plej ofte restarigi en sia kapo la analizajn formojn por kompreni la sintezajn, kaj oni tiel trudos al li tute superfluan spiritan laboron.

Kaj tio ĉi ne estos kaŭzita nur de tio, ke ni kutimis uzadi la analizajn formojn, sed ankaŭ de tio, ke la lingvoj nature evolucias de sintezo al analizo, kaj ne male.

La latinoj diris sinteze per unu vorto « amor » ; la francoj diras analize per tri vortoj « je suis aimé » ; kaj se estas vere, ke nia lingvo estas jam multe pli analizema, ol ĝi estis en la unuaj jaroj de ĝia ekzistado, tre kredinde estas, ke ĝi obeas la komunan leĝon, kaj ke, se D-ro Zamenhof estus komence doninta al ni ian sintezan unuvortan formon, kiel, ekzemple, « man-atas », « vamatas », « lamatas », « ŝamatas », k. t. p., Esperanto pli malpli rapide venus per natura evolucio al la analizaj formoj « mi estas amata », « vi estas amata » k. t. p., kiujn li saĝe tuj donis al ni jam en la komenco.

Anstataŭi la analizajn formojn per formoj sintezaj, ŝajne pli oportunaj, sed efektive pli malfacilaj, estus do simple malprogreso, kaj tia provo ne povus sukcesi, ĉar ĝi estus kontraŭa je la natura evolucio de la lingvo.

P. CORRET.